



3*86

(114)

starto

ORGANO DE
ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO

B A R B U L O J




Legu sur paĝo 7.



STAVEBNICE PODVOZKU NÁKLADNÍHO PŘÍVĚSU

AK-2P



Obsahuje tyto díly:

x náprava	560,— Kčs
x oj	120,— Kčs
x podpěra	20,— Kčs
x pojistná zařízení	50,— Kčs
x 2 ks třmen (č. A 12,50)	25,— Kčs
x 2 ks blatník vč. zástěrek (č. 85,—)	170,— Kčs
x nosník K 1000/0	250,— Kčs
x 2 pneu B Scooter 4x8 (č. 105,—)	210,— Kčs
x 2 duše (č. 15,—)	30,— Kčs
x 2 disky 2,45x8" — typ A (č. 225,—)	450,— Kčs
x 2 hřídele (č. 130,—)	260,— Kčs
	2 584,— Kčs

Montáž podvozku	146,50 Kčs
(s vyřazením tach. příkazu)	2 732,50 Kčs
Celkem cena	

x zábrusný rám karby	310,— Kčs
x ocelová karba	1 360,— Kčs
x os. x nosičky pro ocel. karbu	390,— Kčs

Technické údaje:

váha (bez karby)	cca 50 kg
celková hmotnost	400 kg
uhlíková zařízení	320 kg
max. šířka	1 500 mm
délka	2 500 mm
výška	730 mm

Podvozek nákl. přívěsu AK-2P je bez elektrické instalace (celým není dodáván panel pro tabulku SPZ vč. svítilen) a bez karby, která je v náhradu pro výrobce.

Na podvozek nákl. přívěsu AK-2P je nutno uzavřít písemnou objednávku. Formuláře objednávek vyzádejte na: INKLEMO VD, 100 00 Praha 10, Třebohostická 3, tel. 78 14 749. Dodací lhůta podvozku (vč. montáže) je závislá na přijatém počtu objednávek. Zákazník bude písemně vyzván k osobnímu odjevu.

Jednotlivé díly stavebnice označené x budou samostatně v prodeji výhradně v prodejních VD INKLEMO — Praha:

Praha 1, Skořepka 8	telefon: 26 68 24
Praha 2, Bělehradská 12x	22 95 31
Praha 4, nám. Hrdinů 5	43 54 65
Praha 7, Dukelských hrdinů 4	87 80 16
Praha 8, Sokolovská 170	82 04 81
Praha 9, Sokolovská 201	83 14 24

Na tyto díly nebudeme přijímat objednávky, ani nebudou zaslány na dobírku (s výjimkou litinového nosníku K 1000/0).

Výrobek byl kladně testován (vč. podrobného popisu) v časopise SVĚT MOTORŮ č. 34/1983

Inklemo Praha

esperanto

kuracas

Permesu al mi diri kelkajn vortojn pri tio, kiamaniere kuracadas min Esperanto.

Kelkajn semajnojn post mia komplika operacio mi ricevis leteron de sam. Josef Vaneček, kiun mi antaŭe ne konis kaj kiu legis en ia Esperanto-gazeto mian anoncon, ke mi serĉas korespond-amikinojn kaj ankaŭ amikon por mia 15jara filo, ke mi estas malsana kaj ke mi nur malmulte parolas Esperante, Samideano Vaneček skribis al mi, ke li estas ankaŭ malsana kaj ankaŭ pri tio, ke li havas bonan Esperantan korespond-instruiston, doktoron Hradil. Li rekomendis al mi serioze lerni Esperante, kio certe helpos al mi en mia malsaneco.

Post mallonga tempo skribis al mi doktoro Hradil tre afablan leteron, ke li volonte senpage povas instrui min. En tiu tempo mi kuracis min per radiado, mi estis malforta kaj laca, sed mi komencis lerni kaj skribi hejmajn taskojn. Mi komencis en marto 1984 kaj finis en decembro 1984. Doktoro Hradil perfekte korektis miajn skribtaskojn. Liaj leteroj ĉiam ekĝojigis min kaj ĉe miaj fortaj doloroj mi sentis grandan subtenon. Mi kun streĉo atendis liajn leterojn. Mi ekkonis en li eminentan kuraciston kaj eminentan homon. Sam. Vaneček ankaŭ tre diligente skribis al mi kaj kuragigis min, ankaŭ li tenas en mi esperon.

Mi komencis korespondi Esperante. Amikino el Moskvo konsilis al mi trinki teon kontraŭ pereigaj tumoroj, mi trinkas ĝin ĝis nun. Amiko el Japanujo skribis al mi pri japanaj kuracmetodoj kaj amikino el Anglujo pri tio, kion mi devas manĝi kaj trinki, amikino el Svedujo konsilis al mi gimnastiki.

Ekde somero 1984 mi serioze okupiĝis pri kuracherboj, mi kolektis ilin kaj mi jam povas konsili al malsanaj homoj. Krom eduko de mia filo mi havas novan vivenhavon. Laŭ la vortoj de kara samideano doktoro Hradil: "Krok za krůčkem to půjde s vámi." Kaj tio estas vero. Mi sentas min pli bone, Esperanto kuracas min daŭre, tenas en mi esperon kaj vivigojn.

Mi tre ekĝojis ricevinte vian invitilon; mi tre timis pro la vojaĝo, mi estas tre malforta, sed mi volis ekkoni vin kaj mi veturis tiujn 450 km. Mi volis persone ekkoni karan doktoron Hradil, mi volis esti en la societo de homoj, kiujn mi tre bezonas.

Mi dankas al vi el tiu ĉi loko por ĉio, speciale al doktoro Hradil. Mi dankas al vi por la invito!

Mi deziras al vi ĉiuj multe da sano, optimismo kaj ĝojon en Esperanto-movado.

Kornélia Godová, profesorino
Bratislava

(Dankesprimo de prof. Godová al d-ro Hradil dum la e-ista renkontiĝo en Mnichovo Hradiště)



Fotoj
 el konferenco
 de porpoca sekcio
 en Kladno



el fervojistaro movado



2-a kongreso de polaj fervojistaj esperantistoj.

En la tagoj 20 - 22an de septembro 1985 okazis en la pola historia urbo Swidnica la 2-a tutlanda kongreso de polaj fervojistaj esperantistoj. Jam vendrede posttagmeze alveturadis la partoprenantoj el la tuta Pollando kaj invititaj eksterlandaj kolegoj el Ĉeĥoslovakio, GDR, FRG kaj Hungario.

La ĉefa programo de la kongreso tamen komenciĝis sabate matene. Post la komuna matenmanĝo en la restoracio Piast okazis en la solene dekorita salono de la hotelo Piast solena malfermo de la kongreso, kiun krom la supre menciitaj polaj kaj eksterlandaj kolegoj kaj gastoj partoprenis ankaŭ reprezentantoj de la pola kultura kaj partia vivo, inter ili Albert Kaszewski, la unua sekretario de la urba filio de Pola unuiginta Laborista Partio, Henryk Rataj, vicprezidanto de la Urba Konsilantaro, Zdzisław Olejczyk, direktoro de la vojevodia oficejo, Wiesław Skoczylas, prezidanto de la vojevodia filio de PEA kaj aliaj. Prezidanto de IFEF s-ro Joachim Giessner en sia salutparolo alte taksis vastan agadon de la polaj E-fervojistoj kaj la fakton, ke tiu ĉi agado estas alte takсата kaj subtenata far polaj oficialaj instancoj.

Post la solena inaŭguro okazis en la kongresejo labor-kunsido de la polaj fervojistaj kolegoj, dum kiu oni pritraktis la agadon dum la pasinta fervojista jaro kaj preparolis planon de la plua agado.

Dimanĉe post komuna matenmanĝo ni partoprenis per aŭtobuson ekskurson al kastelo Książ apud Walbrzych.

Jindřich Tomášek

Fervojistaj jarkunveno en GDR.

La fervojistaj esperantistoj de Germana Demokratia Respubliko ĉiujare aranĝas jarkunvidojn, kies tasko estas taksu rezultojn de la kurenta jaro, fari konkludojn kaj determini la estontajn taskojn.

La lasta jarkunveno okazis de la 15a ĝis 17a de novembro 1985 en bela regiono de Saksia Svisujo, en feria loko Pfaffendorf proksime de Königstein. Laŭ invito de germanaj kolegoj partoprenis esperantistaj fervojistoj el Ĉeĥoslovakio kaj Hungario.

Sabate antaŭtagmeze okazis labora parto de la konferenco. Post la varmtaj enkondukaj vortoj la prezidento de FE GDR Achim Meinel raportis pri la dumjara laboro kaj agado. Membraro ne kreskis. Bulteno "Fervojistaj novaĵoj" regule aperadis kun enstanta listo de fakaj fervojaj terminoj - rezulto de laboro de la terminara komisiono. Oni jam alvenis al litero "o". Oni aranĝis ankaŭ partoprenis kelkajn aranĝojn ne nur en GDR, sed ankaŭ en Hungario, Ĉeĥoslovakio kaj Pollando. Kun Hungario, Ĉeĥoslovakio kaj aliaj fervojistaj sekcioj oni plej bone kontaktas kaj kunlaboras, komenciĝis kaj disvolviĝis ankaŭ kunlaboro kun polaj kolegoj, kies ĉi-jaran Duan tutlandan kongreson en Swidnica partoprenis du delegitoj de FE GDR. En 1986 oni plenas laŭeble partopreni 38an IFEF-kongreson en Skopje, Jugoslavio, kaj kelkajn aranĝojn en ĈSSR, Hungario kaj Pollando.

En la nomo de la ĉeĥoslovaka delegacio salutparolis prezidento de FS ĈEA s-ano František Strumínský, en la nomo de Hungara Fervojista Sekcio k-go János Patay. Ambaŭ parolis pri bonaj kontaktoj inter siaj kaj GDR-a sekcioj kaj invitis al kelkaj aranĝoj okazontaj en iliaj landoj en 1986.

Oni devas laŭde menciigi ankaŭ pri la poste okazintaj fakprelegoj - tiu de kolego Horst Jasman "40 jaroj de fervojo en la manoj de la popolo, 150 jaroj de germanaj fervojoj" kaj de kolego János Patay el Budapeŝto pri la hungara fervojo kaj ties kunlaboro kun ĈSD kaj DR.

Sabate vespere ni komune babilis, amuziĝis kaj kantis

kun muzika akompano de la kolego Gerhard Zeidler el Karl-Marx-Stadt. Menciinde estas, ke dum tiu ĉi vespero unuan fojon publike eksonis la "Fervojoista kanto" en prezento far ĉefaj kolegoj laŭ muziko de la ĉefa komponisto Josef Poncar kaj teksto de Bohumil Nádvořník, esperantigita far Josef Cink.

Al ĉiu jarkunveno de niaj germanaj kolegoj apartenas ankaŭ ekskursoj. Dum la unua sabato posttagmeze ni komune veturis per trajno al Dresdeno, kie ni sub ĉiĉeronado de Rita Wirges unue interkonatiĝis kun nova speco de tramtrako sur krucformaj laŭlongaj ŝpaloj, kiu kunligas avantaĝojn de transversaj ŝpaloj kun avantaĝoj de slaboj. Post sukcesplena provo de laŭlonga ŝpalo en laboratorio oni ekde aprilo 1982 testas tiun novan specon de tramtrako sur krucformaj laŭlongaj ŝpaloj dum trafiko sur la dutraka cent dudek kvin metrojn longa testejo, certiganta preskaŭ ekstremajn kondiĉojn /radiuso 220 metrojn, relkromalto 60 mm ktp./. Poste ni komune vizitis la faman ŝtatan Semper-operejon en Dresdeno, 13.2.1945 grave detruitan de bombado, sed dum jaroj 1977-1984 rekonstruitan far germana popolo en origina beleco kaj stilo. El la Semper-operejo ni iris tra historia parto de Dresdeno al Trafika muzeo, kie ni komune vizitis ekspozicion "150 jaroj de la germana fervojo" kaj aliajn partojn de la muzeo.

Dimanĉe antaŭtagmeze ni komune pilgrimis tra parto de Seksa Svisujo, vizitante rokaron Pfaffenstein /La pastora monto/ 427 metrojn alta. Jindřich Tomášek

Ĉina ekspozicio.

La unua kompleksa ekspozicio de ĉinaj libroj en Ĉeĥoslovakio, okazinta dum junio kaj julio 1986 en la Muzeo de nacia literaturo en Praha, reprezentis 500 librojn de 400 ĉinaj eldonejoj. La libroj estis presitaj en la lingvoj angla, rusa, germana, Esperanto kaj ĉina. (jm)

"Ĉeĥoslovaka ŝtata filmo" preparas mallongan filmon pri Esperanto, okaze de la jubileo. Oni jam filmis intervjuon kun Ing. Črdle, kiu parolis pri apliko de Esperanto en la scienco kaj tekniko, kaj en marto estis filmata la elementa kurso de s. Strunčová en Prago. Se la filmo realiĝos, ĝi estos bona propagandilo en la neesperanta publiko. (jp)



Pri "KVARFOLIO" recenzis Nicolino Rossi en Literatura Foiro, n-ro 96: Kvarfolio, kvar ĉeĥaj poetoj, kiuj verkas en Esperanto. Sed kia Esperanto, kiaj sukcozaj esprimoj, kia svingstila lingvouzo! Spite la modestan aspekton grafikan, la broŝurlibreto estas bolejto de lingvaj kaj artismaj surprizoj, kiuj dece celebras nian poezion.

Temas pri kvar aŭtoroj, kiuj prezentas eltiraĵojn el sia lastatempa verkaro. Du el ili, Jiří Karen kaj Eli Urbanová suface bone konatas kaj jam famiĝis en Esperantujo, do legi aŭ relegi iliajn versojn estas regul ilian arttalentan prozodion. Pri Josef Rumler kaj Ĉestmír Vidman mi devas honte konfesi mian kompletan nescion pri ilia verkado poezia, do la surprizo konstati tian elstarecon en la poezikvalito kaj lingvobrila esprimivo estas despli granda kaj gojiga....

La envolumigitaj poemoj de J. Karen en traduko far Jiří Kořínek peras al ni poeton, kiu sian sentomondon pentras per la freŝaj koloroj de la simpla kaj senpereco vorta, kun sugestiaj sonoraj ritme malritmaj, kiuj kontrapunkte reliefigas ĉi kaj tie juvelojn brilantajn metaforojn. Kaj ĉar la vortoj havas ĉe li kaj semantikan kaj sonvibran fascinan, li bele ekspluatas tiajn ecojn, sen apartaj pretendoj, sed kun rezultoj surprize artismaj....



E. Urbanová sendifekte kaj elegante, ritme kaj rimekvilibre, vortfreŝe kaj maltede poemas pri la daŭra temo de la amo, en ĉiuj ties komponantoj: sopiremo virina al la amato, amo kiel korpa kaj spirita esprimo kaj sinrealigo, amdesapontigo, doloro pro amo rompita aŭ ĉesinta, soleculinaj amspiro kaj rememoro. Jen la deirpunktoj de belgaj poemoj, kie la trilo de la verssonoro mirinde kunfandigas kun la esenco de la esprimcelo. Asonancaj kaj aliteraciaj agordoj ofte aldonas ĉarmon al suferaj motivoj de la unuopaj poeziaĵoj. Doloro kaj amo alterne muzikas en la prozodio de E. Urbanová....

Ke J. Rumler estas kompetenta literaturisto, jam atestas ĉivolome lia eseo enkonduka al la poemoj de E. Urbanová, sed lia Lasta ĉevalo lin nekontesteble pravas "la poeto de la jaro", la sensacia malkovro de nova, brila astro en la firmamento stelmalriĉa de nia literaturo. Per Lasta ĉevalo li balade himnas al la naturo, al la rilato de la homoj al naturo kaj ties kreitaĵoj, kies unu nobla ero estas la ĉevalo. Ĝin la poeto personigas, ecigas per ĉiuj eblaj kvalitoj de vira kaj ina sento- kaj sensomondo. Kun la ĉevalo li identigas kiel poeto kaj vortumanto de la angoroj kaj danĝeroj de la runa civilizacio: pli malpli povre esprimite jen pri kio temas la poemo.

La forto kaj ĉefverkeco de la versoj kuŝas en la lingva-

Ĝo mem: lingvo obsede ritma, kun internaj rimoj, asonancoj kaj vortkunmetoj kreive impresaj kaj freslingve ennovigaj. La aŭdacoj semantikaj mirige harmonias kun la simpleco sonora kaj abundvario sentesprima. La ŝajne oftuzo aperintajn sufiksorimojn apenaŭ oni povus rigardi adasismoj, ĉar ili respondas al precize intencitaj, obsede ripetaj sonharmonioj kaj onomatopeoj, kiuj reliefe elstarigas la verŝkonceptojn kaj la lirikismon strukturan. La vorttrezoro riĉigadas je sinonimoj plej nuancitaj kaj je vortkombinoj apenaŭ imageblaj, sed artisme kreeksplođaj, tiom specifaj je la internacilingvaj karakterizoj, ke apenaŭ elpenseblus nacilingvaj ekvivalentoj.... J. Rumler, cehlingve fama verkisto, ekde nemultaj jaroj agema esperantisto en sia lando, alpaŝas firme internacian scenejon kiel giganta figuro de la esperanta poezio nuntempa.

Laste en la volumeto aperas la japaneskoj de Ĉestmír Vidman, malmultaj versoj de fajne lirika tembro, kie diafane traplumas la delikataj sentremoroj de la aŭtoro pri siaj orientaj travivaĵoj. Poemetoj sonorlingve susuraj kiel silkkimona susuro kaj emocivekaj kvezaŭ delogo knabinokula. Evidenta, ke Japanio tre impresas allogas la verkiston kaj lin sorcaltiras orientmonden....

 pri BARBULOJ • pri BARBULOJ • pri BARBULOJ 

En Bulgara Esperantisto n-ro 3/1986 mi legis artikolon de Jitka Tupá pri Barbuloj.

..... La country-grupo "Barbuloj" nun estas unika en la mondo. Tio estas amatora grupo el Prago, kiu plenumas en Esperanto la pliparton de la kantoj en sia repertuaro.

Pri tio kiel fakte ili komencis okupigi pri Esperanto kaj pri muziko ni demandis la gvidanton de la grupo Ietr Nýdl.

"Proksimume antaŭ kvin jaroj, kiam mi organizis nian muzikensemlon, mia patrino, tiutempe kunlaborantino en la sekretariejo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, invitis min partopreni la kongreson de tiu asocio. Tie mi ĉeestis sinprezenton de pola danctrupa kaj al mi venis la ideo, simile al ili, organizi grupon, sed "country". Tiel naskigis la country-grupo "Barbuloj".....

En la grupo partoprenas Eduardo Knopek - kontrabaso, Martin Černý - bango, Zdeněk Smolík - mendolino, Ladislav Vojta - violono, Petr Nýdl - gitaro. Membro de nia grupo fakte estas ankaŭ mia patrino, Naděžda Nýdlová - kiel aŭtoro de la teksto de nia programo kaj kiel programkondukisto. Samtempe ŝi organizas la koncertojn de la grupo kaj plenumas la rolon de impresario.

Mi kunlaboras kun la bonega tradukisto Karel Franc, kiu esperantigis por ni la tekstojn de iuj konataj country-kantoj. Lastatempe ni provas mem verki tekstojn. Kompreneble ni ĉiuj devas ellerni Esperanton. La kreo de nia grupo trovis

gravan apogon ĉe la esperantistoj, ĉar ĝi estas esprimo de ilia ĉefideo pri reciproka interkomprenigo de la popoloj en la mondo. Kaj la kanto estas bonega instrumento por realigo de tiu ideo. Ni aperas ne nur en kongresoj kaj renkontigoj de esperantistoj, sed same antaŭ neesperantista publiko. En tiaj koncertoj ni plenumas ankaŭ kantojn en Esperanto kaj la publiko ĉiam tre bone akceptas ilin."

La grupo "Barbuloj" jam estas konata ankaŭ en eksterlando, ekzemple en Hungario, GDR, Pollando, kie ili aperis en programoj de la radio kaj televido....

Al la alvoko de la pacamaj fortoj per sia arto kontribuas ankaŭ la grupo "Barbuloj", unuigante la kanton kun la lingvo Esperanto, helpe de kiu povas interkomprenigi la homoj en la tuta mondo.

„KOMPUTERO“ - ĉu jes? :

En la n-ro 3/86 de "Paco" Bernard Golden aperigis aprobindan artikolon "Pledo por la termino 'Komputero'". Kvankam certe ĉiuj tiun ĉi artikolon legis, la redakcio de Starto opinias necesa aperigi almenaŭ la ĉefajn kialojn por la termino "komputero".

Mi surprizigis, ke kelkaj anoj de la Akademia Sekcio pri Generala Vortaro proponis, ke la Akademio oficialigu la terminon "komputero". Antaŭ unu jardeko mi same konkludis. Tiutempe mi faris profundan ekzamenon pri la demando kaj kolektis dekojn da citaĵoj ilustrantaj vortuzon de ĉiuspecaj publikigaĵoj. Mi verkis plene dokumentitan studaĵon titolitan "Terminologia Kaoso: komputilo, komputatoro, komputero, komputoro, kompjuero, komputro", kiu estis rifuzita de la redaktoroj de Scienca Revuo, Esperantologiaj Kajeroj kaj Akademiaj Studoj. Eble la 17-paĝa manuskripto estis tro longa; eble miaj vidpunktoj kolizis kun tiuj de la redaktoroj. Ĉiukaze, kelkajn jarojn poste mi sukcesis aperigi mallongigitan version, "Terminologia Kaoso en la Komputeriko", en Kontakto (1980:2, n-ro 66, pĝ. 1 - 17). Mi apogis mian elekton de la termino "komputero" per la sekvaj kialoj.

- a. Ĝi estas la plej internacia inter la proponitaj vortformoj, facile komprenebla lau la skriba formo.
- b. Ĝi havas unu neambiguan signifon, kiu diferencigas ĝin disde aliaj aparatoj uzataj por nombri, kalkuli kaj mezuri.
- c. Ĝi jam estas registrita en PIV kaj aliaj Esperanto-etnolingvaj vortaroj.
- d. La pluformado surbaze de la radiko "komputer-" ne prezentas malfacilaĵojn. Estas sensencaĵo rifuzi tiun ĉi radikon pro la ebla konfuzo de la fina silabo "er" kun la sufikso "-er", ĉar troviĝas pluraj aliaj vortoj en E-o, kelkaj ed Fundamentaj, kies radiko finiĝas per la sama silabo.

konversacio por komencantoj

Tria temo: D O M A R O J

Domoj nur malofte situas solece kiel solejoj. Plej ofte estas domeroj, malpli grandaj vilaĝoj kaj pli grandaj urboj. En vilaĝo estas ŝoseo, flank- kaj kampvojoj, en urboj estas larĝaj bulvaroj, avenuoj, malpli larĝaj sed viglaj ceteraj stratoj. Post pluvo estas sur ĉiuj vojoj koto, se ili ne estas pavimitaj. Veturvojoj estas por veturiloj kaj ĉaroj, flanke estas trotuaroj por piedirantoj. En centro de domero estas placo, tie kuniras pluraj stratoj. Krome estas parkoj kun verdaj herbedoj, kiujn oni nomas razenoj aŭ gazonoj, boskoj kun metode flegataj arboj, sport- kaj ludkampoj. Super akvoj, fosaĵoj kaj valoj estas pontoj. En urboj estas multaj oficoj, vendejoj aŭ butikoj, magazenoj, hospitaloj kaj sanatorioj por malsanuloj, fabrikoj kaj uzinoj, lernejoj, poŝtoj, stacidomoj, preĝejoj, pli grandaj temploj, bele konstruitaj katedraloj aŭ bazilikoj, mahometanaj moskeoj, budhanaj pagodoj, monaĥejoj, kasteloj kaj burgoj, diversaj aliaj entreprenoj kaj publikaj domoj. En vilaĝoj ne estas tiom da publikaj domoj, sed estas bienoj. Bieno estas tuto de diverse grandaj domoj kaj kampoj por terkulturado kaj bestbredado. Krom kampoj estas ankaŭ ĝardenoj kaj plantejoj, kie oni kulturas grenon, fruktojn kaj utilajn plantaĵojn. La konstruaĵoj, en kiuj estas bredataj grandaj dombestoj, nomiĝas staloj.

Domoj situas tuŝapude aŭ estas inter ili publikaj kaj privataj spacoj. Tiuj estas kortoj kaj ĝardenoj, deĝigitaj de aliaj per bariloj, paliseroj aŭ heĝoj el arbustoj. Ĉie estas multaj arboj, ĉar ili purigas aeron. Tiu estas malpurigata per fumo, en kiuj estas cindro, fulgoj kaj aliaj malpuraĵoj. Fumoj estas eligataj de kamentuboj kaj de veturiloj, kies motoroj forbruligas gasojn tiom, ke iam aperas smoga.

Akvodistribuo konsistas el alte situanta provizujo, de kiu la akvo fluas en tuboj pro sia premo. Ie estas putoj, oni pumpas la akvon aŭ ĉerpas per motoro. Analogia estas gasdistribuo kaj eksterdoma hejtado. Malpuraĵojn forkondukas kloakoj, sur kampoj kaj en bienoj estas sterkejoj. En sterkejo estas mulĉo, per kiu oni mulĉas kampojn.

Fervojoj, aŭtobusoj, trolebusoj kaj alia publika trafikilaro haltas en stacioj kaj haltejoj. En kazo de granda trafiko estas por pasaĝeroj peronoj kaj atendejoj.

Malnovaj domoj havis ĉirkaŭ si muregojn, remparojn, fosaĵojn kaj bastionojn. El ili kaj el kelkaj domoj estas nuntempe nur ruinoj. Urboj havis en mezepoko privilegiojn, bla-

zonojn kaj flagojn. Nuntempe la diferencoj inter urboj kaj vilaĝoj malaperas. Ie estas nur diverse grandaj urboj kaj terkulturistaj solejoj, kiuj nomiĝas farmoj. Grandaj urboj havas plurajn partojn, kiuj nomiĝas kvartaloj. Ekzistis ankaŭ antaŭurbo kaj periferio. Urboj organizis privilegie foirojn, kie oni vendis varojn en standoj kaj kioskoj, sed eĉ nur sur tero.

Tendaro aŭ bivako estas domaro konstruita por provizora loĝado dum ferioj. Estas tie spaco kun masto, kie tendaranoj viciĝas por hisi flagojn kaj auskulti instrukciojn. Krome estas tie afiŝtabulo. Programo en tia tendaro estas komencata per veksigado. Manĝoj estas komunaj, vespere brulas ofte tendara fajro. La programon finas dormosigelo, sed patrolo maldormas kaj gardas la tendaron dum tuta nokto. Nun ekzistas tendaroj, kie oni povas liti tendon aŭ budon, aŭ konstrui propran tendon, aŭ starigi tie kampingon, do ĉaron, kiu estas trenata de auto kaj en kiu oni povas loĝi. Komforto en tendaro estas diferenca laŭ eblecoj.

Josef Chvosta

G r a m a t i k o : 1. Elserĉu dek frazojn, en kiuj adjektivoj estas uzitaj atribute kaj uzu ilin komplemente. Ekzemplo: Malnova urbo havas muregojn /atribute/. Urbo, en kiu estas muregoj, estas malnova /komplemente/.

2. Trovu dek substantivojn kaj dividu: prefiksoj, radikoj, sufiksoj, finaĵoj. Ekzemplo: revenanto - re/ven/ant/o.

S t i l o : 1. Priskribu al via eksterlanda amiko la domaron, kie vi loĝas.

2. Skribu pri la administrado de via domaro. Ĉu vi mem iel funkcias?

D e m a n d o j : 1. Kiom da loĝantoj estas en via domaro? 2. En kiu urboparta vi loĝas? Ĉu sur placo, en flankvojo, en grava strato? 3. En kiu tendaro vi estis? Skribu ion pri tiea vivo. 4. Kiujn urbojn kun pli ol miliono da loĝantoj vi konas? 5. Kiom da fervojaj stacioj aŭ haltejoj estas en via domaro?

x X x

La grava ĉeĥa ĵurnalo Zemědělské noviny (Agrikultura ĵurnalo) aperigis la 23-an de majo ampleksan artikolon de redaktoro Pavlína Nuslová titolitan "Esperanto signifas havanta esperon". En la artikolo, kiu estas fakte intervjuo kun prezidento de la praga klubo Helena Štruncová, troviĝas bazajn informoj pri la Internacia Lingvo, pri ĝia historio kaj la nuna stato, pri la Sanmarina scienca akademio, pri la lasta rezolucio de UNESKO ktp. La artikolon ilustras la portreto de L. L. Zamenhof kaj la titolpaĝo de Bulteno de la Praga Klubo.

-te-

BIBLIOGRAFIO DE ESPERANTO KAJ INTERLINGVISTIKO

/Auspiciata de Svisa Nacia Komisiono por UNESKO/
Centro de Dokumentado kaj Esploro pri Lingvo Internacia
/= CDELI/

Biblioteko de la Urbo, strato Progres 33, Poŝtfolio 5038
CH-2300 La CHAUX-DE-FONDS 5, Svislando; tel.: /039/
28-46-12; PĈK: 23-6008-0

CDELI estas versaĵne la plej taŭge ekipita interlingvistika dokumentejo por eldoni la tiom atendatan verkon "Bibliografio de Esperanto kaj Interlingvistiko" sub formo de jar-kajeroj. Tion unuamime asertas la fakuloj gin vizitantaj /instruistoj, esplorantoj, redaktoroj, arkivistoj, gvidantoj de la Esperanto-movado, ktp./ Tial ĉiuj pli kaj pli vigle insistas, por ke CDELI aldonu al siaj servoj tiun de redaktado de la menkanta bibliografio. Marinko Gjivoje, en sia "Konsultlibro pri Esperantaj Bibliotekoj kaj Muzeoj" /Zagreb, 1980/, ne nur registris la arkivejon CDELI inter la plej riĉe provizitaj centroj de interlingvistika dokumentaro en la mondo. Li plie atentigas, ke la apartigo de tiu arkivejo interne de la gin sirmanta Biblioteko kaj ekzisto de tre preciza slipero faras de CDELI imitindan modelon.

Tiuj prijuĝoj kuraĝigis la aŭtoritatojn de la urbo de La Chaux-de-Fonds ekceli la disvolvigon de CDELI, por ke ĝi kapablu ekstarti koncerne la pretigon kaj eldonon de la dezirata bibliografio. Tiel, ekde 1983, la CDELI-bibliotekisto povas dediĉi kvarfoje pli da tempo al la libro kaj arkivo-katalogado, dokumentaro daŭre kreskanta. Krome decidigis eldonplano por la publikigo de bibliografio.

La unua kajero de "Bibliografio de Esperanto kaj Interlingvistiko" eldoniĝos antaŭ la centjara jubileo de Esperanto. Ĝi aperos suture de 1986 kaj listiĝos en ĝi la eldonaĵoj de 1984: libroj, revuoj, artikoloj, broŝuroj kaj diversaj. Ekde tiu eldoniĝos ĉiu suture nova bibliografia kajero rilate al la antaŭaj jaroj. Tiu ĉi agado enskribigas en la porjubilea projekto auspiciata de UEA.

Por ke tiuj kajeroj estu bibliografie kompletaj, gravegas, ke CDELI ricevu aktivan apogon de la libro- kaj revueldonistoj, de la Esperanto-organizaĵoj kaj de la interlingvistikaj medioj, de la ĵurnalistaro, de la sciencistoj, de la produktantoj de kasedoj kaj diskoj, de la organizantoj de kongresoj, kolokvoj, renkontigoj kaj kursoj, de la klub- kaj grup-gvidantoj, ktp. Estu sendata al CDELI por registriĝo specimena ekzemplero de ĉio aperinta en kaj pri Esperanto, en kaj pri ĉia alia planlingvo, kaj koncerne interlingvistikon. CDELI kiel la ceteraj bibliografiaj centroj, povas registri nur ricevitaĵojn.

Publikiĝos katalogo de la CDELI-dokumentaro, kiam la necesa monsumo estos rikoltita. Tiu katalogo estos komenco de Ĝenerala bibliografio de Esperanto kaj Interlingvistiko. Sed antaŭe la dokumentaro mem de CDELI devas esti kompletigita. CDELI jam antaŭdankas al la eldonistoj, organizaĵoj kaj arkivposedantoj, kiuj donecos mankantajn erojn.

La Chaux-de-Fonds, januaro 1986

Nome de CDELI: la direktoro de la biblioteko: Fernand DONZE; la prezidento de la CDELI-komitato: D-ro Tazio CARLEVARO; la bibliotekisto: Pierre-Yves TISSOP; la arkivisto: Claude GACOND; la bibliografia kunlaboranto: Stefano KELLER.

Bibliografio de Esperanto kaj Interlingvistiko

Kunlaboru al la pretigo de kiel eble plej kompleta bibliografio de Esperanto per la sendo de specimena ekzemplero de ĉiuj viaj eldonaĵoj: libroj, gazetoj, grup-informiloj, raportoĵ; kongresajaĵoj, reklamiloj, ktp. Adreso: CDELI: Bibliografio de Esperanto, Biblioteko de la Urbo, Poŝtako 5038, CH-2300 LA CHAUX-DE-FONDS 5, Svislando.

Universitataj tezoj

Mi kompiladas informojn pri universitataj tezoj, disertaĵoj aŭ diplomverkoj, licenciaj aŭ doktoraj, kiuj rilatas al Esperanto, esperantologio, interlingvistiko aŭ al la problemaro de la internaciaj komunikadoj ĝenerale.

Ankaŭ estas bonvenaj informoj pri diplomverkoj el altlernejoj neuniversitataj, kiuj pritraktas la saman temaron.

Ĝis nun mi kolektis 100 titolojn el 25 landoj. UEA eldonos la kompletajn informojn /titolo, aŭtoro, amplekso, universitato, diplomo, resumo de la enhavo ktp./ en broŝuro en 1986.

Germain Pirlot, Kimmelbergstr. 5/B.3 B-8400 Oostende, Belgio

ESPERANTO-LIGO DE KOMUNUMO OSIJEK

preparas la trian Internacian renkonton "Ivan Flanjek", kiu okazos la 20-an, 21-an kaj 22-an de Marto 1987 en Osijek, Jugoslavio.

Ĝenerala temo de la renkonto estos

ESPERANTO kaj TURISMO

Ni invitas vin ĉeesti la renkonton kiel gasto aŭ kontribui per via esperantlingva referaĵo pri la temo. Se vi skribos la artikolon, sendu unu kopiaĵon aŭ resumon al ni ĝis la 31a de Januaro 1987. Dankon!

Limdato por aliĝo estas la 1-a de Marto 1987.

Aliĝkoto estas 1000 din. Prelegantoj ne pagas aliĝkoton nek restadkostojn, la Preparkomitato pagos por ili.

Aliĝojn sendu al adreso: ES "Liberiga stelo", YU-54000 OSIJEK, - Pp 27. Jugoslavio.



KORESPONDDEZIROJ

ANONCOJ

Instruisto interesigas pri turismo kaj folkloro, kolektas bildkartojn kaj fotoalbumojn: Mieczysław Mikołajczyk, ul. Przejazd 15/23, PL-99-200 PODDĘBICE k/Lodz, Pollando.

Novaj geesperantistoj 18- gis 60-jaraj, kiuj agas en Esperanta Rondo ĉe la fabriko "Diora" /kie oni produktas radioricevilojn/ en la urbo Dzierżoniów, interesigas pri ĉiuj temoj: Polski zwiasek esperantystów, Kolo Nr 2 "Homa kompreno" przy ZR "Diora", 58-200 DZIERŻONIÓW, ul. Świdnicka 47, Pollando.

13-jara Dominika volas korespondi kun geamikoj de la tuta mondo. Ŝi kolektas glumarkojn kaj poŝtkartojn. Dominika Antonowicz, Zielony Rynek 4/3, 67-400 WSCHOWA, woj. Leszno, Pollando.

24-jara elektroteknikisto interesigas pri bioritmoj, elektroniko, fotoarto, muziko, poezio, psikologio kaj radioamators komunikaĵo, kolektas bildkartojn kaj sondiskojn: Andrzej Zejdlar, ul. Stoleczna 14 "C"/49, PL-15-879 BIAŁY-STOK, Pollando.

17-jara knabo volonte legas kaj aŭskultas muzikon, kolektas poŝtmarkojn, lia preferata lernobjekto estas la historio. Li volas korespondi ĉefe kun knabino aŭ knabo; lia adreso: László SZUROMI, Rákóczi út 54.8/26., 3300 EGER, Hungario.

26-jara hungara elektroingeniero, laboras nun kiel medicina instrumentisto. Interesas lin la moderna muziko, precipe li ŝatas la muzikon de "Pink Floyd", li kolektas humoraĵojn skribajn kaj desegnitajn, ŝatas vojagi, remi, kajaki, ekskursi, fotografi, legi. Li havas edzinon kaj filineton. Gábor HAJDU, Villamos Uzemérvnök, VIII SZ. Kisip 4322/83, MAKÓ BAJCSY - ZS LTP C/2, Hungario.

Instruisto de elementa lernejo nomata Saigō-Syōgakkō, kie li fondis la klubon nomatan "Internacia", serĉas korespondantojn por la 10-12 jaraj geknaboj, kiuj volas scii pri diversaj landoj kaj pri la vivo de fremdaj popoloj. Ili ne estas esperantistoj, tial la instruisto ĉiun leteron tradukos al ili. Li mem deziras interŝangi aĵobolibrojn por unuaklasanoj. S-ro Kazuya Isikawa, ĉe Saigō-Syōgakkō, Kamisaigō 2606-2, SIZUOKA-KEN, Japanio.

informoj el sekretariejo



K n i ž n í n a b í d k a

·Cviĉebnice esperanta pro pokroĉilé	15.- Kčs
·ABC esperanta	4.-
·Avinjo rakontas	6.-
·Esperanto I	14.-
·Esperanto II	24.50
·808 slovních kmenů	4.-
·Ĉesko-esperantský a esperantsko-ĉeský slovník	7.-
·Amuzaj dialogoj en Esperanto	30.-
·Esperanto lau amuza metodo	26.-
·Esperanta medicina terminaro	19.-
·Geologio internacia	36.-
·Komputika vortero	16.-
·Terminaro de hidr. meĥanismoj	16.-
·Esperanto-terminaro de terminologia fako	9.-
·AEST 1984	30.-
·Homa lingvo kaj komputilo	85.-
·Matematiko, instruado de matematiko	85.-
·Retoj	20.-
·Apliko de komputiloj en medicino	85.-
·Apliko de komputiloj en industrio	85.-
·Bibliografio de polaj eldonaĵoj	3.-
·Slovník výpočetní techniky	85.-
·Pri la varmo	9.-
·SAEST 1982	10.-
·Junulara kantareto	6.-
·Ĝojoj de mia vivo	16.-
·Skandalo pro Jozefo	16.-
·El subaj fontoj	16.-
·De pago al pago	24.-
·Kvarfolio	4.-
·Per kanto al Esperanto	25.-
·Ondro kaj drako	8.-
·Kanto super lulilo	4.-
·Vizagoj	6.-
·Kato en ŝako	7.-
·Melo antaŭ tribunalo	12.-
·Estona panoramo	15.-
·Apostolo de libereco	49.50
·Tutmonda sonoro	175.-
·Trigroŝa romano	45.-
·Perdita honoro de Katarina Blum	37.-
·La transdorsojeto	15.-

· Iom pri la mensa sinpreparo	10.- Kčs
· Febro	39.-
· 111 fabloj	15.-
· Septembra ribelo	10.-
· Rakontoj el ambaŭ poŝoj	27.-
· Sileziaj kantoj	11.-
· Markoloro	6.-
· Riporto sur pendumila maŝo	25.-
· Sur kampo granita	35.-
· La monto	40.-
· Balkana laboristo	10.-
· Somermeze	15.-
· BEA - aktiva batalanto	15.-
· Prozo de Ho Chi Minh	6.-
· Dilemoj de nuntempo	30.-
· Amuza legolibro	20.-
· Meze de Europo	15.-
· Česká literatura v esperantu	9.-
· Historio de Esperanto-Movado en ĈSSR	42.-
· Vilago Borovo	21.-
· Sociologia esploro	5.-
· Sur la vojstreko	5.-
· Vojaĝo al Faremidio	38.-
· Kibernetiko de homa lingvo	42.-
· Elektitaj versaĵoj	6.-
· Legenda militisto	9.-
· Laktiŝto de Mĥekŭla	15.-
· Danco ĉirkaŭ lokomobilo	10.-
· Okupacio	8.-
· Koko krias jam	39.-
· Fioniroj kaj veteranoj MEM	8.-
· Skizo pri Esperanto en Pollando	4.-
· Lingvistika simpozio /Kumrovec/	45.-
· Medalionoj	12.-
· Lumo de orienta Eŭropo	5.50
· Al abelujo....	5.-
· Hasanagaino	9.-
· Kiaj homaj rajtoj?	6.-
· Janusz Korczak	19.-
· La morto	29.-
· Baza literatura krestomatio	39.-
· Nguyen Tral	6.-
· Septembro estiĝos majo	25.-
· Gardu la pacon	23.-
· Estona soveta poezio	8.-

Nabízíme také různé odznaky v ceně od 5.- Kčs do 8.- Kčs

Objednávky adresujte: Český esperantský svaz, Jilská 10,
110 01 Praha 1

ANONCOJ

Fraha

Skupina Barbuloj se zúčastnila akce Dny Plocku /PLR/, kde měla několik velmi úspěšných vystoupení. Za dobrou reprezentaci Českého esperantského svazu a za pěkný kulturní příspěvek pro Dny Plocku jim osobně poděkoval starosta města Plock. Barbuloj také hráli při svém pobytu v Jugoslávii, kde měli několik úspěšných vystoupení.

Sekretariát nabízí ještě na letošní rok možnost předplatného věstníku SANO /vydává zdravotnická sekce/ za 24.- Kčs na rok. Také je možné si ještě předplatit časopis Internacia fervojisto, který přináší zajímavé články o hnutí železničářů-esperantistů. Časopis stojí 35.- Kčs ročně. Přihlášky přijímá: Jiří Pištora, Útvar ŽPO, Slovanská ul., 560 02 Česká Třebová.

12.4. pořádali železničáři v Závodním klubu Tesla Strašnice zábavný večer s tombolou. K poslechu i tanci hrála skupina Barbuloj. Škoda, že o tento velmi pěkný zábavný večer, jakých se pořádá málo, nebyl zájem mezi esperantisty. Železničáři chtějí i v roce 1987 pokračovat v tradici, záleží jen bude-li mezi esperantisty zájem o podobný zábavný program.

Sekretariát přijme do trvalého pracovního poměru dva zaměstnance /zaměstnankyně/ ve středním věku, nejlépe z Prahy nebo okolí.

Tábor

Jihočeský kraj má nejméně místních skupin /jen tři/ ze všech krajů CSR. V červnu se tyto MS /Tábor, Písek a České Budějovice/ sešly na společném setkání v Táboře, kde MS Tábor připravila hodnotný kulturní program, k němuž přispěli několika vystoupeními i Barbuloj.


STARTO - presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská 10, CS-110 01 PRAGO 1, Ĉeĥoslovakio. Aperas 6-foje jare. Redakta komitato: Jaroslav Kašparec, Jiří Hanousek (grafika aranĝo), Miroslav Malovec, Jiří Patera (responda redaktoro) kaj Helena Štruncová. Presas RUCH Liberec. Transdonita al la presejo la 31-an de aŭgusto 1986. Jarabono 24 CSK, por eksterlando 36 CSK aŭ 10,50 NLG, inkluzive de sendkostoj. Abonantoj turnigu al niaj perantoj, al UEA aŭ rektavoje al nia asocio.

STARTO - nepravidelný věstník Českého esperantského svazu, Jilská 10, 110 01 PRAHA 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Redakční rada: Jaroslav Kašparec, Jiří Hanousek (grafická úprava), Miroslav Malovec, Jiří Patera (odpovědný redaktor) a Helena Štruncová. Povoleno odborem kultury NVP č. 310008385 ze dne 18. 3. 1985. Tiskne RUCH Liberec. Předáno do tisku 31.8. 1986. Dohlédací pošta Praha 07. Snížený poplatek za poštovní povolen ředitelstvím pošt Praha pod č.j. P/1-1267 ze dne 6. 4. 1979.

**Výtvarná řemesla
Praha**

**Vám nabízejí široký
sortiment bytových
dopiňků a dárkových
a upomínkových
předmětů,
vyráběných převážně
v malých sériích
s častou inovací.**

NABÍZÍME:



**SOUSTRUŽENÉ MOCCA SOUPRAVY
SOUSTRUŽENÉ ODKLÁDACÍ STÓLKY
MALOVANÉ PORCELÁNOVÉ SOUPRAVY
I JEDNOTLIVÉ KUSY
MALOVANÉ A BROUŠENÉ VÁZY, MÍSY
A POPELNÍKY
VÝROBKY Z CÍNU**

**BIŽUTERII KOVOVOU A KOŽENOU
A DALŠÍ SORTIMENT Z KOVU, KŮŽE,
KOŽENKY A TEXTILU**

Adresy prodejen upomínkových a dárkových předmětů:

110 00 Praha 1, Národní tř. 37	22 41 94
110 00 Praha 1, Vodičkova 28	24 47 71
110 00 Praha 1, Spálená 39	29 27 04
110 00 Praha 1, Na poříčí 35	23 17 315
110 00 Praha 1, Křížovnické nám. 2	26 63 28
120 00 Praha 2, Anglická 18	25 98 56
110 00 Praha 1, Lazarská 5	29 83 22
110 00 Praha 1, Železná 12	22 79 14
170 00 Praha 7, Obránců míru 17	37 44 84
110 00 Praha 1, Můstek – stanice metra	26 14 19
360 00 Karlovy Vary, Mariánská 2	930/28 381

**V našich prodejnách
naleznete
vhodné dárky
pro každou příležitost.
Naše pracovnice Vás
ochotně obslouží
a pomohou vybrat
předmět,
který potěší.**

Vzorkovna nábytku:

110 00 Praha 1, Václavské nám. 41	26 40 64
-----------------------------------	----------

přijímá objednávky na individuální zakázky
nábytku a bytových doplňků.

**Český esperantský svaz
110 01 PRAHA 1, Jilská 10**

NOVINY

Dohlédací pošta Praha 07
Snížený poštovní poplatek povolen
Ředitelstvím pošt Praha
J. ZN. P/1-1267/79 ze dne 6. 4. 1979